

NI REVENAS AL ĈEESTAJ RENKONTIĜOJ

Post la fino de la alarmostato, eblas nun denove fizike renkontiĝi en Madrido, eĉ se atentante la rekomendojn de sekureco. Do, Madrida Esperanto-Liceo decidis reveni al tiu ĉi maniero, kaj ni organizos ĉeestan renkontiĝon en la unua sabato de junio.

Tial, madridaj esperantistoj estas invitataj rendevui la 5an de junio, je la 18,30 horo, en la Parko Retiro. La renkontiĝejo estos la statuo de Ricardo Codorniu, proksime al la Vitra Palaco (*Palacio de Cristal*), koordinatoj: 40°24'45"N, 3°40'51"W.

Ni kuniĝos en malgrandaj grupoj, kaj tre atentos la bazajn kriteriojn pri KOVIM-prevento.

PREZENTOJ DE MIGUEL FERNÁNDEZ

Dum la monato majo, nia samideano Miguel Fernández prezentis siajn verkojn en du virtualaj ne-esperantistaj forumoj.

La 8an de majo li partoprenis en poezia agoro, Ágora Getafe, kun la titolo "Literaturo kaj engaĝiĝo". Li estis gastigata de la poeto Armando Silles kaj la aŭtoro Enriqueta de la Cruz, pere de la platformo Zomo (*Zoom*).

Ankaŭ per Zomo, kun la titolo "Esperanto kaj poezio" kaj invitita de la Asocio de Emerituloj de la Urbodomo de Madrido, la 10an de majo Miguel prezentis sian plej lastan libron "Semilla de arbol".

DEBATO PRI LA ESTONTO DE EŬROPO

Ĉu esperantoparolantoj apogas proponojn favorajn al nia lingvo en la kadro de la Eŭropa Unio? Se tiel, ni uzu la eblecon partopreni la civitanan dialogon, kiu estis oficiale lanĉita antaŭ kelkaj tagoj kadre de la Konferenco pri la estonteco de Eŭropo. Kiel elemento de la Konferenco la eŭropuniaj civitanoj estas invitataj proponi kaj diskuti ideojn, kiamaniere la EU evoluu.

La Eŭropa Komisiono starigis platformon por tiu civitana kundiskuto, pere de la retejo: <https://futureu.europa.eu/> (havebla en ĉiuj 24 oficialaj lingvoj de EU).

Kelkaj proponoj jam afiŝitaj rilatas al la lingva reĝimo de la EU (komuna lingvo, lingva justeco, ktp.). Kelkaj el ili pledas por la uzo de Esperanto, kaj vi povas trovi ilin pere de la interna serĉilo.

La eŭropaj E-asocioj proponas ke oni koncentriĝu sur la plej apogataj, kaj inter ili, oni povas speciale atenti tiun proponitan de esperantisto el Onubo (Huelva), kun la anglalingva titolo: "Esperanto, a common and neutral language, designed to be easy to learn. A new tool for a more united European Union". Ĝi estas nun la plej voĉdonata en la sekcio "Aliaj ideoj". Trovu ĝin en la ligilo: <https://futureu.europa.eu/processes/OtherIdeas/f/8/proposals/5399>.



aperitivo literario
VINO
y habló de literatura
sábado, 8 de mayo, 12.30h

INTERVIENEN:
ARMANDO SILLES, POETA
ENRIQUETA DE LA CRUZ, NOVELISTA

ESCRITOR INVITADO:
MIGUEL FERNÁNDEZ, POETA Y ESPERANTISTA

Tema de hoy: "LITERATURA Y COMPROMISO"
Con la actuación musical de Alicia Ramos

(con VINO a mano!)
Apoya ÁGORA GETAFE

BICIKLISTA SEMAJNO

La BEMI-semajno estas internacia evento por biciklistaj esperantistoj, organizata de la Biciklista Esperantista Movado Internacia.

En ĉi tiu jaro ĝi celebriĝos inter la 12 kaj la 20 de junio en Kastelo Greziljono. Sabato estos alventago, dimanĉo forirtago. En ĉiu el la sep aliaj tagoj oni ekskursos bicikle tra la bela pejzaĝo en la regiono de la rivero Loire [Luar], fama pro siaj kasteloj. Certe oni vizitos iujn el ili, kaj aliajn interesajn vidindaĵojn. Por koni pli da informoj, vizitu la retejon: <https://bemi.tejo.org/semajno/>.

Nia madrida kolego Santiago anoncis sian partoprenon kaze ke iu alia deziras vojaĝi kune. Skribu al lia adreso: santiago.camblor@gmail.com.

VIRTUALAJ KONGRESOJ, UNIVERSALA KAJ HISPANA

Konsiderante la plej lastatempajn evoluojn kaj prognozojn, la estraro de Universala Esperanto-Asocio decidis kun bedaŭro nuligi la ĉeestan 106-an Universalan Kongreson (UK) en Belfasto. Anstataŭe okazos duafoje la Virtuala Kongreso de Esperanto (VK) dum la tagoj antaŭviditaj por la UK, nome de la 17-a ĝis la 24-a de julio, kaj sub la sama temo: "Paco kaj konfido: universalaj valoroj".

Jam eblas aliĝi al ĝi, kaj atingi la unuajn informojn, en la retejo <https://vk.esperanto.net/>. La aliĝo al la VK estas senpaga por Individuaj Membroj (IM) de UEA (kaj TEJO), kiuj aliĝas ĝis la 4-a de julio 2021. Provizora programo baldaŭ aperos.

Ankaŭ la estraro de Hispana Esperanto-Federacio (HEF) anoncis la unuajn preparojn por la 79a Hispana Esperanto-Kongreso. Estis decidite okazigi la kongreson la tagojn 2an kaj 3an de oktobro 2021, pere de iu reta platformo, ankoraŭ elektota.

La provizora programo enhavos, inter aliaj, prelegon de Duncan Charters, du libro-prezentadojn, blokon da prelegoj sub la temo "Scienco kaj Esperanto", filmeton kun pecoj el kelkaj pasintaj kongresoj, kompilo de ŝercoj en Esperanto cirkulantaj tra la sociaj retoj, kaj membro-kunvenon. Atentu pluajn informojn, diskonigotajn en venontaj datoj.

GRAVA INFORMO DE HEF

Grava informo: la ĝenerala kunveno de HEF okazos la venontan dimanĉon 6an de junio. Kontakti kun la estraro por koni la detalojn, en la adreso admin@esperanto.es.

POR PLIAJ INFORMOJ

Por novaĵoj en Madrido, vizitu regule la retejon de MEL <http://www.esperanto.es/mel>, kaj la retliston https://groups.google.com/g/esperanto_madrid/.

En *Fejsbuko* vizitindas la forumo de MEL: <https://www.facebook.com/esperanto.madrid/> aŭ la pli ĝenerala <https://www.facebook.com/groups/esperanto.madrid/>.

En la socia retejo Tŭitero (*Twitter*), vi povas trovi nin ĉe: <https://twitter.com/LiceoMadrida>.

Por informiĝi pri aliaj tutmondaj agadoj virtualaj, vizitu la retejon <https://eventaservo.org/>.



madrida esperanto-liceo

Rodríguez San Pedro 13-3º-7. 28015 Madrid

Regulaj kunvenoj lunde je la 18,30 horo en la sidejo

<http://www.esperanto.es/mel/>

madrid@esperanto.es



Redaktas Toño del Barrio

Komentojn kaj informojn sendu al niavocho@gmail.com